# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale



PLENUMITA 16/12/2021 Kvincentsesdekunua eldono (unua eldono 20/09/2011)

## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu** *Google Translate* **kiel vortaron**

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)
**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

## Entute 799,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas 287,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas 218,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas 187,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas 107,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde aprilo 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la koronaviruso. Do portu maskojn.



## La Esperanta Retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.

**Esperanta Retradio**



Ankaŭ akvon oni povas planti

**8/12/2021**



**3ZZZ** La temoj de la elsendo de la 13a de decembro estas : projekto por malpliigi la kvanton de karbondioksido en la aero, la avantaĝo ne uzi monbiletojn kaj monerojn kaj redaktita eltiraĵo de la prelego pri la evoluo de arkeoptero al birdo de Hong Sung Ho. Plie eblas aŭdi parton de la koncerto de UEA


Informas *Franciska Toubale*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



## EKSTRAÎOJ ĈE LECIONOJ EN LA "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). N.ro 65 de "Por Komencantoj".




GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Ĉu en la adjekto oni ĉiam rajtas ŝanĝi la akuzativon al konvena prepozicio?
2). Ĉu en la rekta objekto oni en Esperanto ĉiam rajtas ŝanĝi la akuzativan –n de la kernvorto al konvena prepozicio?
3). Donu ekzemplo(j)n de suplemento en eblaj neadjektaj lokoj en la frazo "La nebuleto anoncas la sunon".
4). Kial gramatika numeralo estas adjektivo? Kaj kiam ĝi escepte estas substantivo?
5). Donu kelkajn (almenaŭ du) ekzemplojn de prepozitivoj ŝanĝeblaj al akuzativo.

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E.. numero 561.

*Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 18a de decembro estos la tria sabato. Venu *Roger Springer*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ: *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917)*



1). Jes, ekz. "Ni iros hejmen" al "Ni iros al hejme" kaj "Ni restis la tutan tempon" al "Ni restis dum la tuta tempo".
2). Neniam.
3). "La nebuleto en la mateno anoncas la sunon de la tagmezo".
4). Ĉar ĝi determinas (priskribas) substantivon.
Escepte se ĝi indikas ne la kvanton de io sed la literon skribitan: "la (litero) 'kvar' forfalis".
5). "Ni vojaĝis al Romo (Romon)", "Ni restis dum la tuta vintro", ""Ni enloĝis en la karavano", :Ni subvelis sub la ponto".

*Marcel Leereveld.*

**Artikoloj por AE**. Se vi trovas taŭgan artikolon por AE kaj ne fidas vian Esperantan nivelon, uzu la aŭtomatan tradukilon de Guglo kaj sendu ĝin rekte al AE rogerspringer@tpg.com.au;

# Mortigado punatu !

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro1917*



**FORGESO.**


En la pasinta A.E., en la kopio de la artikolo pri mi en The Age, Roger forgesis mencii la nomon de la verkinto, la konata ĵurnalistino CAROLYN WEBB. Honoron al ŝi, pro ŝia propagando por Esperanto!

**DUA FORGESO.**

Viktorio forgesis puni la kaŭzantojn de la multegaj virusmalsanuloj kaj de la pluraj mortoj pro la viruso. Ne la homojn kiuj hazarde ne samopinias kiel tiuj kiuj ne volas esti vakcinataj, sed tiujn kiuj kun ebla viruso ne rajtis viziti aliajn personojn kaj tamen faris, kontraŭ la ordono de la registaro. Tiuj krimuloj riskis, kaj faris, grave plimultigi la nombron da malsanuloj kaj da mortintoj. Kial la viktoria popolo ankoraŭ ne punis la kulpulojn de tiu krimo? La krimo estas, ne zorgi ke malsanoj kaj mortoj okazu. Mi kaj vi ja punatas, se ni ne helpas homon kiu estas en danĝero. Mi kaj vi punatos, se per malobeo al la registara regulo homoj riskas morti. Sed tiuj homoj, escepte por ricevi ankaŭ mem la viruson, ne punatas. Mi proponas, ke ni publikigu la nomojn de tiuj riskuloj. *Marcel Leereveld.*



Mi ŝatas la arbon, kiun mi plantis antaŭ 30 jaroj sur komuna tero de 4 domoj



Unu najbaro ne ŝatis la problemetojn kiujn ĝi kauzis kaj pagis por ĝia forhako sen konsulto kun mi.

*Roger Springer*